



# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 1 Januaro, 2011



FELICXAN NOVJARON !!!

*La redakta teamo elkore salutas ĉiujn niajn estimatajn legantojn okaze de la Nova 2011 jaro! Sanon kaj sukcesojn al vi! Kiel donaco bv legi la fabelon de nia senlaca aŭtoro – Gregoro. Kutime kaj agrable ni ricevis multajn salutkartojn: de la Pola Konsulejo en Ŝikago, urbestro de Milano, niaj multaj partneraj E-kolektivoj de la tuta mondo kaj de niaj membroj, kiuj ne partoprenis la Zamenhofan tagon. Dankon al ĉiuj!*

*Bv ankaŭ subteni Horhe – korespondanton de nia E-societo per bl/karto aŭ letero. En nia tempo de la totala komputorigo sur la Insulo de Libero la Interreto ankoraŭ restas malliberigata. Dankon al la reeĥantoj!*

–La Redakcio

## Princino Aŭrora

Tio okazis antaŭlonge. En iu antikva lando loĝis princino, vera princino kun sankta nomo Aŭrora. Ŝi radiis belecon, kvazaŭ leviĝanta Suno. Ĉiumatene, ĝuste je la sepa ŝi eliradis al balkono de la reĝa palaco, kaj pergeste salutis homojn, troviĝantajn sur la placo. Responde ĉiu metis la dekstran manon al sia koro kaj ĝentile kapklinis. Ne nur junuloj, sed ankaŭ junulinoj diris amravite pri sia princino, diris honore pri ŝiaj gepatroj. Ja dank' al ili en ties lando regis paco kaj konkordo, dolĉaj kaj kuraceblaj, kiel pura mielo. La reĝo Dionis la Unua kaj reĝino Helena des pli amis ŝin – sian unusolan filinon, zorgeme rilatis al ŝi. Tamen ve, ĉu eblas defendi eĉ principon de ĉiu malbono, des pli de malbono nevidebla? Foje vento, aŭ venteto alblovis sur la balkonon ion nevideblan, kio kaŭzas malsanon “kokluŝo”. Konata al infanoj, ĝi devigas tusi.

Homoj sur la placo kaj aliuloj ne devas vidi tusantan principon. Ĉirkaŭ ŝi klopodis kuracistoj, vartistoj, astrologoj... Ĉiuj ili tre penadis forpeli ties malsanon. Tamen la princino tuis eĉ fine de l' tria semajno. Tial ĉiumatene, ĝuste je la sepa sur la reĝa balkono aperadis frejlino laŭ nomo Flora – plej konfidita helpantino kaj amikino de Aŭrora, aspektsimila al ŝi. Ŝajnis, neniu plu divenis pri la portempa anstataŭigo. Rimarkis tion la dua frejlino – Gloria. “Kial oni konfidis ne al mi la ritan eliron?” – meditis ŝi tiel ĉagrene, ke hazarde prononcis aŭdeble: “Ah, povrulineto – malsana Aŭrora!”... Vento kaptis tiun ĉi novaĵon kaj disblovis ĝin laŭ la tuta ĉefurbo.

“Mi! Nur mi! Ĝuste mi! Ĉu mi ne meritas anstataŭigi la malsanan principon almenaŭ por unu horo?! – kriadis,

interrompante unu la alian, tre kaj ne tre belaj junulinoj. “Aĥ, ja vesto, solena vesto mankas! Nacesas akiri ĝin!”...

Tage kaj nokte el terakotaj porkidoj ŝutiĝis moneroj: oraj, arĝentaj kaj eĉ kupraj. Tage kaj nokte negocistoj liveradis en la ĉefurbon elegantajn ŝtofojn. Silkon, lino, fajna kotono kaj eĉ valorega purpuro plenigis varpakojn. Tage kaj nokte fasonistinoj, tajloristinoj kaj la junulinoj mem laboris, kreante fest-vestojn.

Ĉirkaŭ la palaca arko amasiĝis dezirantinoj principiniĝi almenaŭ por unu horo. Palacestro volis forpeli serĉantinojn de nemerita gloro. Tamen iu el astrologoj diris: “Ne punu tiun, kiu strebas puni sin mem”. Do, la palacestro ordonis al laboristoj konstrui antaŭ la palaco longan podion, signife pli longan ol la reĝa balkono. Ja sur la balkono povus lokiĝi ne pli ol dudek personoj. Sed, kiel determinis la ĉefa kontisto, ĉe la arko atendis junulinoj nombre pli ol mil – 1111!

Baldaŭ ĉiuj ĉarpentistoj de la ĉefurbo kaj eĉ aliaj

viroj, scipovantaj enbati najlojn, venis al la palaco. Veturiloj unu post alia liveradis ligno-tabulojn kaj longajn ligno-ŝtipojn. Plentage aŭdiĝis akutsonoj de segiloj kaj martel-frapado. La podio estis preta vespere. Kaj sekvantmatene sur ĝi enlokiĝis ĉiuj 1111 belvestitaj avanturistinoj, soifantaj la principinan rolon almenaŭ por unu horo. Ili svingis permane, kvazaŭ per flugiloj, sendis tra la distanco kisojn... Tamen preterirantoj nur moke ridetis kaj ridis.

Subite sur la reĝa balkono aperis belega Aŭrora. Ĝojo de plimultaj samurbanoj ekflamis, kiel radioj de frumatena sunleviĝo. Pretendantinoj al gloro returniĝis, kaj sur la lignan podion ekgutis, kiel pluveto, iliaj larmoj, eksonis



ilia ploro. Kial ili ploris anstataŭ ĝoji? Nun oni diras: “Ili domaĝis pri mono, vane elspezita por akiri valorajn vestojn”. Tamen sep-jara knabino Nika certas, ke ili simple konfuziĝis. Ties larmoj forlavis ilian stultecon. Ja nur liberiĝante de l’ stulteco, oni iĝas pli saĝaj. Jen kial la plorintaj junulinoj, antaŭ disirado, diras: “Sanon kaj feliĉon al vi, nia kara, unusola princino Aŭroro! Ni amas kaj amos vin ĉiam! –Gregory S. Dolgin

## Zamenhofa Tago 2010



Ega frostoj, forta vento kaj subita abunda neĝo ne malhelpis la sukceson de nia ĉi-jara tradicia Zamenhofa Festo, kiu denove okazis en la eleganta salono de la “Skyline” 415-Howard-Turo en Evanstono.

Kvankam dum multaj antaŭaj jaroj ni festis la naskiĝdatrevenon de Nia Majstro en iu etna restoracio de Ŝikago kaj kutime nomis tion “Zamenhofa Bankedo”, la ĉi-jara “Zamenhofa Bufedo” estis eksterordinare hejmeca, ĝoja kaj bongusta. La barataj manĝoj kaj polaj dolĉaĵoj abundis, ankaŭ franca konjako, aŭstralia vino kaj litova ŝaumvino (de neekzistanta lando Sovetio) “Soveckoje Ŝampanskoje” kontribuis al la bona humoro de la partoprenantoj.

Domaĝe, pluraj ne alvenis pro la malfavora vetero. Ne povis veni la invititaj gastoj de la Pola Konsulejo kaj Komitato de Ĝemelaj Urboj de Ŝikago. Mankis niaj eksterŝtataj membroj de Viskonsino, Indiano, studenta E-kolektivo de Urbana-Ŝampano, mankis konstantaj muzikantoj: flutistino Tina kaj gitaristo Byron. Ne sukcesis veni nia pianisto Jerzy Dobrzynski por ludi F. Chopin omaĝe al la 200-jariĝo de la fama pola komponisto. Sed, surprize, ni ekhavis du novajn ludistojn kun elektronaj muzikiloj, kiuj helpis al ni kune kanti en la ukraina, pola, angla, rusa\* kaj Esperanto. Eĉ 10-jara Taisia Kolganov kaj la plej juna membro de nia E-societo, 20-monata Davido-Armano dancis kun ni je internaciaj ritmoj. Samideano Gregory Dolgin deklamis siajn ĉarmajn E-poemojn kaj elrusigaĵojn (espereble, ili aperos en sekvantaj n-roj).

Ni ĝuis rigardi la novan E-filmon “Senmova” de uson-turka reĝisorino Tuğçe Madayanti Sen. Ŝi eĉ planis viziti nian bankedon, sed en la lasta momemnto la alveno estis nuligita, kvankam ni ricevis permeson publike montri la filmon.

La tempo pasis rapide – kvar horoj ŝajnis nesufiĉe por tiel bona aranĝo. –L. Kordylewski

\*(Red.) En la menciitaj lingvoj ni plenumis nur la unuan strofon de la E-tradukitaj kantoj.

## Anonco

Ĉu estas membroj en via grupo, kiuj povus esti membroj de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto <<http://aaie.us/doku.php?>> Membroj ricevas la landan Bultenon kaj la ILEI-Internacian Pedagogian Revuon. ILEI estas la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj <<http://ilei.info/>>. Ĉu iuj ajn en via grupo celas instrui Esperanton, eble eĉ en la biblioteko, kie vi kunvenas? –Ron Glossop

## El Nia Poŝtkesto

Kuba E-isto Horhe deziras kaj pretas (!) korespondi pri ĉiuj temoj: Jorge Abreu, S. Sanchez, Cruces-57500, CFGOS, Cuba-Kubo.

### Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Viktoro Pajuk  
8228 O’Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
[www.esperanto-chicago.org](http://www.esperanto-chicago.org)

### Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk  
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski  
Eksprezidanto – Roberto Stalzer  
Sekretario – Gertrude Novak, MD  
Kasisto – Karlo Gunn

### MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;  
Familia membro: \$30,  
Regula: \$20  
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn  
828 S. Ada St,  
Chicago IL 60607-4105

### KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library  
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL  
Kunvenoj komenciĝas  
je 7 p.t. en la Suda  
Konferenca Salono, unua etaĝo.**

### SEKVANTAJ KUNSIDOJ

25an de Januaro – d-ro Kordylewski:  
“Bahaa kredo”

22an de Februaro – tradukarto, E-versioj de T. Ŝevĉenko poemoj okaze de 150-jara datreveno de lia morto (majstroklason gvidos certigita tradukisto)

...26an de Junio – tradicia pikniko